

La Progresanto

REDACTIE-
COMITÉ

G. P. DE BRUIN
G. J. DEGENKAMP
W. F. KRUIT

STUDIEBLAD VAN DE BOND
VAN ARBEIDERS-ESPERANTISTEN
IN HET GEBIED VAN DE NEDERLANDSE TAAL
f 1.75 per jaar; f 1.25 voor leden van F.L.E.
Postgiro 331133

H. KUYT
JAC. LEM JR.
H. VAN LIER
J. VAN SCHEEPEN
H. VELTHOVE

REDACTIE EN ADM.: G. J. DEGENKAMP, ROELANTSTRAAT 4, AMSTERDAM-W.

ADJEKTIVO AŬ ADVERBO!

Adjektivo rilatas al substantivo; adverbo al verbo. La diferenco ŝajnas klara, sed en verbo ĝi ne estas tia. Oni konsideru, ke ne ĉiu substantiva ideo estas substantivo. En la frazo *labori estas utile*, la vorto *labori* prezentas substantivan (abstraktan) ideon; *labori* tamen ne estas substantivo, sed verbo (infinitivo). En *estas bone*, *ke li faris tion*, la vorto *bone* rilatas al la substantiva ideo *ke li faris tion*. Tiu ĉi ideo estas esprimita nek per verbo, nek per substantivo, sed per subjekta propozicio. En *mi opinias necese*, *ke li faru tion*, la vorto *necese* rilatas al objekta propozicio, same substantiva ideo.

Ke la menciitaj ideoj, resp. *labori*, *ke li faris tion* kaj *ke li faru tion*, estas efektive substantivaj, oni tuj konstatas, anstataŭigante tiujn ideojn per *tio(n)*: *tio estas utila*, *tio estas bona*, *mi opinias tion necesa*. Se tiuj ideoj ne havus substantivan sencon, ili ne estus anstataŭigeblaj per substantivoj.

Ke eĉ infinitivo en tia frazo havas substantivan sencon, oni krome konstatas, aldonante substantivon al la predikato. Ni prenu kiel ekzemplon la zamenhofan frazon *rajdi sur leono estas danĝere*. *Danĝere* formas en tiu frazo la predikativon; ĝi rilatas al *rajdi*. Se oni kompletigas la frazon per *ago*: *rajdi sur leono estas danĝera ago*, la vorto *danĝera* rilatas al *ago*, sed la tuto: *danĝera ago* rilatas al *rajdi*, same kiel *danĝere* en la nekompleta frazo.

Infinitivo estas formo de verbo, sed ĝi povas esti diversamane uzata: 1e, kiel efektiva verbo: *ni devas labori*, do post ia helpa verbo; 2e, kun substantiva senco, jen kiel subjekto: *labori estas utile*, jen kiel objekto: *ni ŝatas labori*.

Ĉar en ĉiuj menciitaj ekzemploj la

parenceco inter vera substantivo kaj substantiva ideo estas tre forta, ŝajnas lingvistike ĝuste, ke en ĉiuj tiaj kazoj la vorto rilatanta al tia ideo estu adjektivo, do: *labori estas utila*; *estas bona*, *ke li faris tion*; *mi opinias necesa*, *ke li faru tion*.

Tiu ĉi rezono estas logika, kaj tamen en la praktiko ni vidas, ke preskaŭ regule oni uzas en tiaj kazoj ne adjektivon, sed adverbon. Kial? Kial Zamenhof mem enkondukis la adverban formon kontraŭ la logiko kaj kontraŭ la reguloj, kiuj en pluraj lingvoj ekzistas pri adjektivoj kaj adverboj?

Ni povas nur supozi liajn motivojn. En lia propra praktiko ni konstatas, ke en la komenco li uzis ofte adjektivojn, sed pli kaj pli li anstataŭigis ilin per adverboj. Laŭ opinio de kelkaj Zamenhof faris tion laŭ konsilo de de Beaufront. Ĉu tio estas vera, ni ne scias. En la „ekzercaro“ li donis adverbajn kiel modelojn.

Ni tamen inklinas supozi, ke praktikante la lingvon, Zamenhof mem konstatis, ke la adverbo estas pli oportuna ol la adjektivo. Unualoke ni konsideru la t.n. senpersonajn = sensubjektajn esprimojn, en kiuj ne nur ne ekzistas subjekto, sed en kiuj oni ofte eĉ ne subkomprenas substantivan ideon: *estas bone*, *estas vere*, kaj precipe: *bone*, *ĝuste*, *trafe*, *bedaŭrinde*, *strange*. La aspekto de tiaj ĉi esprimoj kaj de frazoj, en kiuj *bone*, *ĝuste* k.s. rilatas al dependa propozicio, estas preskaŭ simila: *estas vere* kaj *estas vere*, *ke li faris tion*; *bone* kaj *bone*, *ke li skribis*. Kaj Zamenhof eble mem konstatis, ke estus strange uzi en la unuaj esprimoj adverbon kaj en la aliaj adjektivon.

Kaj dualoke ni konsideru ion, kio kvazaŭ

LASTILASTE!

Ni preferus vidi la diskuton pri „ĉu ne?“ jam finita. Tamen, ĉar k-do Van Scheepen enkondukis la temon, ni lasas al li la lastan parolon. Red.

RESPONDO AL K-DO SLIJPER

U zigt: „Als we in eenzelfde zin op dezelfde plaats twee woorden kunnen bezigen, die volkomen dezelfde functie verrichten, dan behoren die woorden tot dezelfde grammaticale soort.“

Ja, U hebt gelijk. „Ho ve“ b.v. behoort tot de groep tussenwerpsels. Men kan zeggen: „Ho ve, li kuniras“, en analoog daaraan: „Jes (ne), li kuniras“. Met de eerste zin drukken wij onze spijt uit, bij de tweede de bevestiging (of ontkenning). Omdat „ho ve“ tussenwerpsel is, is „jes“ of „ne“ het op diezelfde plaats ook. Hier bewijst U het zelf met bovenstaande stelling.

In de zin „certe, li kuniros“ is „certe“ een beknopte bijzin: „tio estas certa, ke li kuniros“. Dat kunt U met een tussenwerpsel niet doen, omdat dit geen grammaticale functie in een zin heeft.

In P.V. zoudt U gezien hebben, dat „ne“ zowel tussenwerpsel als bijwoord kan zijn. Niet wij hebben het dus gepromoveerd, wij constateren slechts.

Uw stelling is wel juist, doch in Uw voorbeelden schakelt U twee woorden te-

zamen, die niet dezelfde grammaticale functie hebben. En daarop strandt Uw bewijsvoering.

Als U dus wilt zeggen: „Mi jes pravas“, dan geeft U „jes“ de functie van een bijwoord, wat het niet is. Als U dan meent Uw gevoel logisch te hebben weergegeven, dan geloven wij, dat U alleen maar hebt voldaan aan Uw „nationale“ gewoonte, en zelfs dat niet eens ten volle. Want U zegt: „Ik heb *wel* gelijk“ en niet: „Ik heb *ja* gelijk“. En „wel“ is eigenlijk de bijwoordelijke vorm van het bijvoeglijke „goed“. „Hij heeft *wel* (goed) gedaan“. Een woordelijke vertaling zou dus moeten luiden: „Mi *bone* pravas“, welke vorm in Esp. niet gebruikelijk is. Waarmee we maar willen zeggen, dat het „gevoel“ zich veelal reeds op een dwaalweg bevindt. J. van Scheepen.

Dem.: Kiel mi traduku „komencoj“ en „La idea armilaro, la spirita ilaro, genia eltrovo por similaj, naivaj kaj malmultkapaj komencoj de ŝtata kunvivo?“ („Jarmiloj pasas“, 219-3).

Resp.: „... eenvoudige, ongekunstelde en uit geringe hoofden bestaande grondslagen van het gemeenschapsleven van de staat.“

detruus nian en la komenco donitan tezon: ke la vorto estas adjektivo. Ni prenu la ekzemplan frazon *ni ŝatas labori*, en kiu *labori* plenumas la rolon de objekto. Malgraŭ la substantiva senco de *labori* ni ne povus diri: *ni ŝatas bona labori*. Kial ne? Ĉar en *labori* oni malpli konsideras la substantivan ideon, sed pli konsideras la ideon verban: la agon. Laŭ-idee la vorto estas substantiva, laŭsignife, kaj precipe laŭforme: verba. Klara distingo ekzistus, se oni uzus tiukaze substantivigitan verbon: *laborado*, do: *ni ŝatas bonan laboradon*. Sed la lingvo perdus multe, se ni tiukaze ne povus uzi infinitivon. Suferus pro tio ĝia belsoneco, facila uzebleco, oportuneco; ĝi fariĝus rigida kaj tro malfacila. Sendube Zamenhof konsideris tiun fakton, kaj ni ne mirus, se ĝi efektive instigus lin uzi la adverbos pli vaste, eĉ kontraŭ la rigora logiko kaj lingvistika rezono.

En la praktiko ni ne sentas, ke la adverbaj formoj estas malpli logikaj. Lernanto facile konformiĝas al la regulo: nur vera substantivo postulas adjektivon; ĉiu alia substantiva ideo bezonas adverbos.

Ekzistas tamen unu kazo, en kiu adverbos povas kaŭzi miskomprenon, kaj en kiu oni sentas, ke adjektivo estas pli logika: la predikativo. En la frazo *mi opinias serioze, ke li faris tion*, la vorto *serioze* povas rilati kaj al *opinias*, kaj al *li faris tion*. Uzante adjektivon por la dua signifo, ni povas diferencigi jene: *mi opinias serioze (= serioze opinii)*, *ke li faris tion*, kaj: *mi opinias serioza, ke li faris tion (ke li faris tion estas serioza)*. Tamen, nekonsekvence estus uzi nur por tiu ĉi kazo adjektivon, kaj cedi ĝin en la aliaj, antaŭe menciitaj. Kaj due: tiom longe, kiom ne ekzistas absoluta regulo, ke ni *devas* uzi adjektivon, unuj ĝin uzas, aliaj ne, kaj la leganto tamen ne havas eblon ĉiam scii kia estas la celita senco.

La sola solvo ŝajnas al ni, ke la Lingva Komitato esprimu sian opinionon, kaj konsilu aŭ tute ne uzi adjektivon en tiaj frazoj aŭ uzi ĝin nur en la lasta ekzemplita predikativo. En la praktiko ni jam konstatas, ke kelkaj aŭtoroj sentas bezonon uzi adjektivon, skribante: *mi opinias serioza, ke...*

POR KOMENCANTOJ

H. Kujt.

Vertalingen zende men voor de 10e van de volgende maand aan het redactie-adres Roelantstraat 4, Amsterdam-W.

Overgankelijke en onovergankelijke werkwoorden. (II)

In het Nederlands kent men dus naast overgankelijke en onovergankelijke werkwoorden ook nog werkwoorden die nu eens overg., dan weer onovergankelijk zijn, bijv.:

A. Overgankelijk: De bediende breekt het glas. De man begint zijn werk om acht uur en eindigt het om vijf uur. De voorzitter verandert de agenda. De arbeider rolt het vat over de weg. De jongen draait het gezicht naar rechts. De tuinman buigt de takken opzij.

Ontleding van een dezer zinnen: De man begint zijn werk om acht uur. Gezegde: begint; onderwerp: (wie begint) de man; bepaling waar de handeling op overgaat (deze noemt men in het Nederlands: lijdend voorwerp): zijn werk; bepaling (van tijd): om acht uur.

B. Onovergankelijk: Door de drukte breekt het glas. Het werk begint om acht uur en eindigt om vijf uur. Het weer verandert. Het vat rolt de trap af. De aarde draait om haar as. Door de wind buigen de takken.

Ontleding: Het werk begint om acht uur. Gezegde: begint; onderwerp: het werk; bepaling (van tijd): om acht uur. Hier is dus geen bepaling te noemen waar de handeling op overgaat, deze voltrekt zich in het onderwerp.

Deze werkwoorden, die men hier in het Nederlands eerst overgankelijk, later onovergankelijk gebruikt ziet, zijn in Esperanto slechts overgankelijk, bijv.: La servisto rompas la glason. La viro komencas sian laboron je la oka horo kaj finas ĝin je la kvina. La prezidanto ŝanĝas la tagordon. La laboristo rulas la barelon sur la vojo. La knabo turnas la vizaĝon dekstren. La ĝardenisto fleksas la branĉojn flanken.

De werkwoorden in bovenstaande zinnen kunnen in deze vorm niet onovergankelijk voorkomen. Maar men moet de zinnen onder B toch ook in Esperanto kunnen vertalen. Dit kan, met behulp van het achtervoegsel *igi*; dit achtervoegsel maakt overgankelijke werkwoorden onovergankelijk, het belet het kunnen overgaan van de handeling. Bijv.: *Pro la bruo la glaso rompiĝas. La laboro komenciĝas je la oka horo kaj finiĝas je la kvina. La vetero ŝanĝiĝas. La barelo*

ruliĝas de la ŝtuparo. La tero turniĝas ĉirkaŭ sia akso. Pro la vento la branĉoj fleksiĝas.

Voorts zijn er nog werkwoorden, die in het Nederlands ook overgankelijk en onovergankelijk zijn, maar in Esperanto slechts onovergankelijk. Hierover in het volgend nummer.

Ter vertaling. Opgave 8.

De wieken van de molen draaien snel. Van schrik brak het meisje de glazen. Door de vele boeken buigt de plank. De acteurs zullen hun spel om acht uur beginnen. De wagens rolden over de straat. De secretaris eindigde zijn rapport met enkele aansporende woorden. Door het slechte weer veranderden de plannen. Men rolde de vaten opzij. Door de hitte veranderde men het programma. Om tien uur eindigde de voorstelling. De onderwijzer draaide het bord om. Bij dat huis eindigt de weg. Buig het ijzer als het heet is. Door de storm brak de vensterruit.

Vertaling van opgave 6.

Venu ĉi tien¹⁾ kaj kunportu paperon kaj krajonon. Mi preferas, ke vi eksidu²⁾ ĉi tie. Ne maltrankviliĝu³⁾; ni estos hejme antaŭ mallumiĝo⁴⁾. Mi diktu⁵⁾ ion al vi. Estas necese, ke ni multe studu⁶⁾. Permesu al mi, ke mi foriru⁷⁾. La knabo petegis al mi, ke mi ne punu lin. Kursanoj, estu ĉiam diligentaĵ⁸⁾. Mi petis al li, ke li venu pli frue. Donu akvon al la hundo, ĝi soifas. La prezidanto instigis la membrojn, ke ili multe propagandu. Ni esperu, ke morgaŭ estos⁹⁾ bela vetero. Ne foriru tro mallrue, por ke vi estu¹⁰⁾ hejme antaŭ mallumiĝo⁴⁾. Estas dezirinde, ke vi legu tre multe. Morgaŭ ni promenos¹¹⁾. Ni ripozu.

1) Niet: zonder N; *ĉi tie* noemt de plaats, waarheen de richting is; men meent soms, dat deze richtings-N na *veni* niet noodzakelijk is, men vergelijkte: *Venu (iru, promenu) ĉi tie* (ne en alia urbo) en la parkon. Nu is het woord *parko* het doel van de richting. *Venu ĉi tien* = Kom hier (heen). 2) Ook: *sidiĝu*. 3) Ook: *ne maltrankviligu vin*. Niet: *malkvietiĝu*; dit betreft het uiterlijk, bijv.: *li marŝis per kvietaj paŝoj*; *trankvila* betreft meer innerlijke zaken, bijv.: *Pro la danĝero li estas maltrankvila*. Vaak kan men een keus doen uit beide woorden, bijv.: *Li trankvile (kviete) parolis al mi*. 4) Ook: *mallumo*. Niet: *antaŭ mallumiĝos*; dit laatste woord is een onpersoonlijke zin evenals: *neĝas, frostas*, k.t.p. en moet verbonden worden aan de voorafgaande zin door een voegwoord. Het voorzetsel

DE EXAMEN-VAKKEN

2. HET DICTEE

Is een gemakkelijker examenvak dan het dictee denkbaar? Je schrijft precies wat voorgelezen wordt, en de zaak is in orde. Dat het bij velen toch niet helemaal in orde komt, blijkt bij elk examen, en moet dus wel bijzondere oorzaken hebben. Die oorzaken zullen wij hieronder bezien en u dan meteen vertellen wat u hebt te doen om voor dit vak een hoog punt te verdienen. (Een onvoldoende is voor dit vak bijna uitgesloten.)

Heeft men een minder sterk gehoor, dan vrage men de commissie al van tevoren om een plaatsje vooraan in de zaal, maar wachtte daarmee niet tot na afloop van het dictee.

Is men wat zenuwachtig en vreest daardoor een en ander niet te kunnen volgen, dan sla men een niet begrepen woord even over en vulle het in bij het laatste voorlezen van het dictee.

In het dictee komen als regel geen weinig bekende woorden voor. Aangenomen wordt, dat de candidaat alle of bijna alle woorden kent. En is hem een enkel woord onbekend, en zelfs niet uit het zinsverband af te leiden, dan kan men het beter oningevuld laten, dan maar een woord op goed geluk te fantaseren. De moeilijkheid van het dictee bestaat in hoofdzaak in de kapjesletters en vooral de sisklanken. Zorg er dus voor, dat ge weet wanneer c, g, j, s met en wanneer zonder kapje te gebruiken. Een algemene fout als *reçivi* i.p.v. *ricevi* getuigt alleen van slordigheid.

De A-candidaat worden fouten betreffende de leestekens niet zwaar aangerekend. Toch behoeft het geen kunst te zijn komma's, punten, vraag- en uitroepen zelfs aanhalingstekens op de juiste plaats te gebruiken. Beter dan een uitvoerige opsomming te geven van alle gevallen, waar die tekens gebruikt behoren te worden, kunnen wij de raad geven in

antaŭ kan alleen geen dienst doen als voegwoord, dus *antaŭ kiam* of *antaŭ ol.* 5) Niet: *lasu min ion dikti al vi*; hier is sprake van een wens, welke het onderwerp tot zichzelf richt. Zie: „La Pr.” No. 6. Niet: *studas*; na de uitdrukkingen: *esti necese*, *esti dezirinde*, volgt de gebiedende wijs, het tot stand komen van de handeling (*studi*) is een gevolg van het nodig zijn. 7) Niet: zonder J; *kursanoj*, waar *diligentaj* iets van zegt, is meervoud. 9) Niet: *estu*; de wens betreft hier slechts hopen, de eventuele vervulling van de handeling (mooi weer zijn)

boek of krant eens nauwkeurig na te gaan hoe en waarom zij daar toegepast zijn. Voelt ge u op dit punt zwak, maak er dan een kleine studie van.

Schrijf geen hoofdletters, waar ze niet horen, noch vergeet ze, waar ze wel horen te staan. Een kleine letter na een punt bijvoorbeeld is geen bewijs van nauwgezetheid! Vele kandidaten schijnen een afkeer van punten te hebben, wanneer die op een i of j behoren te staan! Een verkeerd gebruikte (of weggelaten) n, j, deelwoordsuitgang e.d. is natuurlijk niet te verontschuldigen met de opmerking, dat het betreffende woord niet goed verstaan is. Als u de grammatica kent, weet u vanzelf hoe die uitgangen moeten zijn, ook al zijn ze niet duidelijk verstaan.

En hierop komt eigenlijk de gehele belangrijkheid van het dictee neer: als men de spelregels volkomen en de grammaticale regels voldoende kent, kan het resultaat niet anders dan goed zijn. Die kennis vult meestal wel alles aan, wat men meent niet goed verstaan te hebben. Het dictee getuigt dus minder van uw goed gehoor dan van uw talenkennis.

Dem.: Kiel vi opinias pri la kunmeto „disde” en: „...”, tiel ke klare distingigos la familia disde la persona nomo, la urbo disde la distrikto?”

Resp.: La signifo estas klara: zodat familie- van voornam duidelijk te onderscheiden is. Iafoje oni uzas „disde” pro la diversaj signifoj de „de” por eviti miskomprenon. „Disde” signifas proksimume: uit elkaar. La kunmeto ŝajnas al ni ne rekomendinda, ĉar „dis” laŭ sia karaktero konvenas nur al agoj, do al verboj. Pli flua estas la frazo kun „inter”: „sur (laŭ, per) kiu oni povas klare distingigi inter familia kaj persona nomoj, inter urbo kaj distrikto.”

kan geen gevolg daarvan zijn. 10) Niet: *estos*; na *por ke* volgt de gebiedende wijs, wat na dit voegwoord staat is een wens. 11) Ook: *iros promeni*. Niet: *morgaŭ ni promenu*, dit betekent: laat ons morgen gaan wandelen. Dit is dan als voorstel (wens) bedoeld. In de Nederl. zin is sprake van een handeling waarvan de vervulling reeds zeker is.

P.W.W. en G. 9, H.J. en A. 5, A.A.D. en Z. 7, Stelano 6, J.M.T. 9, Astor 10, C.v.B. en M. 9, J.v.G. en R. 5, Johano 8, H.K. en H. 6, G.A. en R. 9, J.R. en A. 9.

DE KOMENCANTO AL PROGRESANTO

J. Lem

Opgave 9. Vertaal in Esperanto:

EEN BEZOEK AAN DE AMSTER-
DAMSE DIERENTUIN
(Vervolg)

Nu gaan wij naar de apenrots (*porsimia roko*). Zie (eens), hoe dartel en lenig (*facilmovaj*) onze vierhandige vrienden zijn. Hun ledematen zijn geheel ingericht op klimmen en springen. Daar zit een moederaap met een jong. Het jong heeft zich met de vingers vastgeklampt (*alkrociĝis*) aan de borstharen der moeder. Plotseling springt de moeder op, klimt in een boomstam en springt op de rots. Het jong blijft onbeweeglijk aan de borst der moeder hangen. Het is haast niet te geloven hoeveel kracht er in die kleine vingertjes zit. Ginds zitten twee apen bij elkaar. De een buigt de kop voorover, terwijl de ander iets schijnt te zoeken tussen de haren van zijn metgezel. Van tijd tot tijd grijpen de vingers iets en steken dat in de mond. „Bah!” zegt een der omstanders, „hij vangt vlooiën en eet die op”. Stel u gerust, verontwaardigde toeschouwer (*rigardanto*), apen hebben geen vlooiën. Maar wat doet hij dan? In het vocht (*malsekaĵo*), dat de zweetklieren uitscheiden (*sekrecii*), bevindt zich zout, dat onder de invloed van de lucht kristalliseert (*kristaliĝi*) en zich aan de haren vasthecht (*gluiĝi*). Deze zoutkristalletjes zijn voor de apen een lekkerij (*trandajo*). Het z.g. „vlooiën” (*senpulgado*) dient (*utili*) ook als een bewijs (*pruvo*) van vriendschap en onderworpenheid. Als een aap u zijn vriendschap wil betonen (*montri*), maakt hij een „vlooiende” beweging op de hand, die ge hem toesteeft of, indien hij u niet kan bereiken, zelfs op de vloer. Als een kleine aap door een grotere wordt bedreigd, kunt ge soms zien, dat de bedreigde gaat liggen, zijn belager als het ware (*kvazaŭ*) uitnodigende hem te (gaan) „vlooiën”. Een bewijs van onderworpenheid.

Ook de mensapen (*antropoidoj*, *antropoidaj simioj*, *homsimilaj simioj*) verdienen onze aandacht. Tot hen behoren: de orang-oetan (*orangutango*), de chimpansé (*simpanzo*), de gorilla (*gorilo*) e.d. Het loont de moeite (*valoras la penon*) het gedrag dezer merkwaardige dieren aandachtig gade te slaan. Op het vooramalgige speelveld heb ik eens gezien hoe een orang-oetan de bladeren van een afhangelende (*malsuprenpendanta*) tak van een plataan wilde grijpen. Daar zij

buiten zijn bereik (*atingpovo*) waren, haalde hij een kistje en ging daarop staan. Nog kon het dier de bladeren niet bereiken; toen nam hij een stok en trachtte daarmee tegen de bladeren te slaan. Hier zien wij hoe de orang-oetan op primitieve wijze gebruik maakt van een werktuig. De mens bewerkt zijn stok, maakt er een pijl, een hamer of iets dergelijks van om des te beter zijn doel te bereiken. Het dier, dus ook de mensaap ontbreekt dit vermogen. Men bedenke, mensapen (*homsimilaj simioj*) zijn geen aapmensen (*simisimilaj homoj*).

(Wordt vervolgd).

Vertaling van opgave 8.

VIZITO AL LA AMSTERDAMA
ZOOLOGIA GARDENO
(Daŭriĝo)

Ni daŭriĝu nian promenon. Sur sabla tereno, apartigita je tri flankoj de la promenojeto per longfosajo, en kiu floras nimfeoj kaj naĝas belegaj orleŭciskoj, ni vidas kelkajn kamelojn, sovaĝajn azenojn, longkornan bovon, strutojn, nandojn kaj pavojn. Jen staras la impona kamelo. Ĝia tuta korpostrukturo alkonformiĝis al la vivo en la dezerto. Al (je) ĉiu piedo troviĝas du fingroj, kiuj dum la irado large etendiĝas kaj, ĉar ili estas interligitaj per la haroj, malhelpas (malobligas) la piedojn tro profunde eniĝi en la sablon. Vidu, ĝi povas fermi la naztroujojn, pro kio la varmegaj, akraj sableroj ne povas penetri en la nazon; la okuloj estas ŝirmataj kontraŭ la sableroj per longaj okulharoj. Dika, laneca felo ŝirmas la beston kontraŭ la varmigaj sunradioj, sed ankaŭ kontraŭ la akra (trancha) malvarmo. La ĝiboj sur la dorso ne estas ornamaĵoj, sed grasrezervuoj. Dum la somero, kiam la kamelo povas trovi sufiĉe da nutraĵoj, tiuj ĝiboj pleniĝas per graso; pro tio la besto ne pereas pro malsato dum la vintro, kiam ĝi ne povas trovi sufiĉe da nutraĵoj; ĝi tiam parte vivas per sia graso. Ĉirkaŭ la fino de la vintro tiuj ĝiboj similas al malplenaĵ, sur la dorso pendantaj, sakoj. Jen iras du strutoj, viro kaj virino. Grandaj, strangaj (kuriozaj) birdoj. Kvan-kam ili havas plumojn, do ankaŭ flugilojn, same kiel ĉiuj aliaj birdoj, ili tamen ne povas flugi. La degenerintaj flugplumoj estas malrigidaj kaj netaŭgaj por la flugado. La longaj, dikaj kaj fortikaj kruroj iom kompensas la mankon pri flugkapablo. Strutoj povas tre rapide (rapidege) kuri. Kurante, ili uzas la flugilojn kiel remilojn. Ili havas malgrandan,

KOMPATINDA LOGIKO!

Sub la titolo „Tempindikaj konjunkcioj”, en L.P. de majo '47a, ni montris la haosan uzadon de tiuj vortoj en la praktiko, kvankam logike ili formas ian simetrian sistemon. Ni pruvis i.a., ke la subjunkcioj „ĝis kiam” kaj „dum kiam” estas logike korektaj, malgraŭ la fakto, ke ili ne estas ĝenerale uzataj. Nia celo ne estis rekomendi tiujn formojn; ni nur pledis por ilia korekteco.

Jam ofte oni atakis tiujn formojn, sed neniam sukcesis kondamni ilin el la vidpunkto de la logiko. Dirante, ke ili estas malbelaj aŭ netradiciaj, oni pruvas nur la malforton de la propra argumentado. Beleco estas tre relativa. Oni memoru nur la iamajn diskutojn pri „ujo” kaj „io”, en kiuj ambaŭ partioj i.a. nomis la malŝatatan sufikson malbela. Ĝustedire en lingvo nur tio estas malbela, kion oni persone ne ŝatas.

Kaj la tradicio? Se oni perforte klopodas forigi lingvan formon pro tio, ke ĝi ne estas tradicia, oni perfortas ankaŭ la liberon apliki la gramatikajn regulojn en plejble vasta senco. Ĉu tradiciaj estas la multaj libere kreitaj formoj de Grabowski, Rotkvič, Jean Forge kaj precipe de Kalocsay? Nepre ne! Kaj la publiko ilin neniam ĝenerale akceptos. Kaj tamen, el lingva vidpunkto tiuj formoj meritas seriozan studon. Ĝenerale ili ne estas kontraŭfundamentaj.

Kontraŭfundamentaj ankaŭ ne estas „ĝis kiam” kaj „dum kiam”. Se oni rajtus nomi kontraŭfundamenta ĉiun formon, kiu ne laŭvorte troviĝas en la Fundamento, oni neglektus la tutan evoluon de la lingvo.

En „Sennaciulo”, febr. '48a, s-ro Waringhien fine eltrovis definitivan mortigilon por „dum kiam”: „„dum” montras daŭron kaj „kiam” tempopunkton.” Laŭ tio ambaŭ ideoj do estus inter si kontraŭaj! Ni argumentis, ke tiu rezono ne estas ĝusta. Se ni demandas: Kiam vivis Zamenhof? ni atendas kiel respondon ne

tempopunkton, sed la tutan daŭron de lia vivo. Kvindek sep jaroj ja estas tempodaŭro, ne -punkto!

En la maja numero de „Sennaciulo” Waringhien rebatas jene: „La subjunkcio „kiam” difinas ĉiam tempopunkton, t.e. tempospacon, kiu povas esti pli-malpli longa, sed kiun la parolanto rigardas kiel daton en la kronologio, kaj ne kiel elvolvigantan daŭron.”

Ni neniam sciis, ke punkto povas esti pli malpli longa. Naive ni kredis, ke, se punkto longiĝas, ĝi fariĝas linio, kaj se tempopunkto longiĝas, ĝi fariĝas tempodaŭro. Waringhien do eltrovis la longan punkton, sendube la unuan miraklon en la historio de l' scienco. Ni esfas tre dankaj al la scienco pro ĉiu nova malkovro, tamen, koncerne la malkovron de s-ro Waringhien ni restas provizore iom skeptikaj!

Serioze: per la „longa punkto” la kondamnemo pri „dum kiam” k.s. nun montris sian plej malfortan flankon!

KOREKTO

S-ro O. Ginz en Praha, atentigas nin, ke la klarigo pri „inkunablo” (L.P. apr.) ne estas ĝusta. Kutime oni nomas inkunablo verkon aperintan ĝis 1500a; en iuj landoj oni aldonas kelkajn (nemultajn) jarojn. Ni danke korektas.

Dem.: Kion signifas „kadro” en la jena frazo: „Ni sendos al niaj perantoj kadron de listoj...?”

Resp.: Ni konjektas, ke oni celis kolektion, tutan daŭ listoj. La vorto „kadro” ŝajnas al ni ne ĝuste elektita.

Dem.: Kion signifas „precizoj” en „al tiu komisiono ni donos ĉiajn precizojn?” Ĉu pli ĝuste: „precizajn informojn?”

Resp.: „Precizoj” signifas ĉi fraze „bizonderheden”. La substantiva formo „precizo” estas tre malofta.

platan kapon kaj grandajn, brilantajn okulojn, per kiuj ili povas akre vidi; la orellruoj estas bone videblaj. La mal-longa, larĝa, per korneca ungo provizita beko ebligas al ili engluti grandajn objektojn. La nutraĵojn ili ne maĉas aŭ rompas. Elektemaj ili ne estas. Eĉ ŝtonojn aŭ aliajn malmolajn objektojn ili englutas. La kovado de la ovoj kaj la flegado de idoj estas la tasko de la virstruto. La strufino tute ne okupas sin pri tio. La ovoj estas tre grandaj; la ŝeloj estas tre dikaj kaj malmolaj. Unu

strutovo pezas proksimume tiom, kiom 25 kokovoj. Rekte staranta virstruto estas alta preskaŭ 2½ metrojn (du metrojn kaj duonon, du kaj duonan metrojn) kaj pezas proksimume 75 kilogramojn. Oni trovas strutojn en Afriko kaj Okcidenta Azio. Kutime ili vivas simbioze kun antilopoj kaj zebroj.

(Daŭrigota)

L.H.P. en R. 7, P.M.W. en G. 6, C.v.S. en R. 6, J.R. en A. 7, G.A. en R. 8, A.A. v.d.K. en G-V. 7.

POR PROGRESANTOJ

J. van Scheepen

Vertalingen zende men voor de 10e van de volgende maand aan het redactie-adres Roelantstraat 4, Amsterdam-W.

Opgave 10. Vertaal in Esperanto:

De geweldige ontwikkeling van de techniek van het snelvriezen binnen 30 jaar tijds, vindt haar oorzaak in de snelle opkomst van het bedrijf zelf. Om hiervan een indruk te krijgen, moet men zijn blik vooral naar de Verenigde Staten richten. De gesteldheid van het land heeft daar meer dan elders de ontwikkeling van het snelvriezen in de hand gewerkt. Men denke aan de vele grote steden met hun miljoenenbevolking, die elke dag opnieuw een geweldige hoeveelheid vers voedsel nodig hebben, terwijl de plaatsen waar dit voedsel geproduceerd wordt (de landbouwstreken, of — voor de visserij — de kust) soms op tientallen tot honderden mijlen afstand liggen. Het transport, in het bijzonder van vis, groente en fruit, over die afstanden en in die hoeveelheden leverde grote moeilijkheden op, zodat men vaak tot verschillende conserveringsmethoden zijn toevlucht moest nemen. Dit is de oorzaak dat b.v. de blik-conserven-industrie in Amerika zo'n hoge vlucht genomen heeft. Maar er is wel een zeer groot verschil tussen het verse product en het ingeblikte. In het bijzonder geldt dit b.v. voor het vitamine! C in groente en fruit, waarvan bij de voor het steriliseren²⁾ noodzakelijke verhitting een groot deel verloren gaat.

¹⁾ vitamine = vitameno

²⁾ steriliseren = steriligi

(Drs. C. v. d. Broek)

Uit Ned. Studieblad

Fakte¹⁾ estas mirige²⁾, ke³⁾ en ĉi tiu⁴⁾ tempo⁵⁾ de forte⁶⁾ plivastiganta⁷⁾ internacia trafiko ankoraŭ necesas⁸⁾ surtabligi⁹⁾ la problemon de universala¹⁰⁾ helplingvo. La homo, kiu montras sin¹¹⁾ majstro¹²⁾ pri la venkado de teknikaj¹³⁾ malfacilaĵoj kaj kiu nome kun konfuza¹⁴⁾ facil(ec)o scias solvi la trafikajn problemojn, la¹⁵⁾ sama homo troviĝas¹⁶⁾ ŝajne¹⁷⁾ senhelpa¹⁸⁾ kontraŭ¹⁹⁾ la plej granda trafika obstaklo, konsistanta el²⁰⁾ la multeco kaj la diverseco de la naciaj lingvoj. Ja la nuntempo²¹⁾ situacion, en kiu oni postulas de ĉiu, kiu volas movi sin internacie, konon²²⁾ de la plej ĉefaj²³⁾ lingvoj, oni ne povas senskrupule nomi ideala²⁴⁾. Dum kiam²⁵⁾ la modernajn trafikilojn oni adaptis tute al la maksimumaj rapid(ec)o kaj util(ec)o²⁶⁾, oni malzorgas pri la plej elstaranta²⁷⁾ trafikilo,

nomita²⁸⁾ lingvo. Oni kaptas²⁹⁾ ĉiun ajn eblon (por) spari tempon kaj monon ĉe la internacia trafiko, sed oni (tute) ne pensas pri adopto³⁰⁾ de ĉi tiu ekonomio al la lingvo, kiu fine devas ebligi ĉiun kontakton kun (inter) aliaj personoj.

D-ro W. Manders.

1) „Het” wordt niet vertaald. Ook: *verdire*. 2) Een zelfst. naamw. ontbreekt; vandaar, dat het Esp. de bijwoordelijke vorm bezigt. 3) Zie 1. 4) Men moet steeds goed de woorden „deze” en „die” onderscheiden, waarvan het eerste met „ĉi” wordt vertaald, het tweede niet. Ook: la *nuna*. 5) Ook: *periodo*. 6) Ook: *ege*, *intense*. 7) Ook: *pligrandiganta*, *kreskanta*. 8) Ook: *estas necese*. 9) Ook: *atentigi pri*, *pridiskuti*, *ke oni metu en la tagordon*. 10) Ook: *tutmonda*. 11) Ook: *montranta sin*. Niet: *montrante*, d.i.: terwijl hij zich toont. 12) Bepaling van gesteldheid; mag dus geen *n* hebben. 13) Ook: *teknikaj*. 14) Ook: *konsterna*. 15) Ook: *tiu*. 16) Ook: *staras*, *estas*. 17) Ook: *kvazaŭ*. 18) Als bepaling van gesteldheid met *a*. Als bijwoord bij „troviĝas” met *e*. 19) Ook: *antaŭ*. 20) Ook: *en*. 21) Beter dan *hodiaŭ*, welk woord ook ter vertaling van „vandaag” wordt gebruikt. 22) Ook: *scion*. 23) Ook: *gravaj*. 24) Zie 11. 25) Wij verkiezen hier de vorm „dum kiam” boven het ook veel gebruikte „dum”. Ook: *dum ke*; Niet: *dume*. 26) Ook: *ekonomio*, *laŭceleco*. 27) Ook: *plej esecan*, *plej superan*. 28) Liever niet: *nomata*. Het noemen is reeds voorbij en dus is de toestand van „het genoemd zijn” ingetreden. 29) „Ekkaptas” wordt niet meer gebruikt, „kapti” is reeds een kortstondige handeling waarbij „ek” vrijwel een pleonasme is. 30) Ook: *apliko*.

Beoordeling: G.C. te Svisio 7; L.P. te R. 7; Astor 8; J.A. te Den H. 6; N.W. te A. 8; J.T. te D 8.

Astor Nr. 5. 8. (Pro ia eraro mankis la poento sub la koncerna ekzerco).

KORAN DANKON

al ĉiuj, kiuj kompleze cedis al ni jan. kaj febr. numerojn de L.P. por novaj abonantoj! Ni ricevis eĉ el eksterlando. Eventuale ankoraŭ sendotaj ekz. tamen bonvenos. Adm.

DE LA ADMINISTRACIO

Ni tre petas al ankoraŭ ne pagintaj abonantoj kaj — koncerne kolektivajn abonojn — al sekciaj estraroj, ke ili bonvolu baldaŭeble sendi al ni siajn abonmonojn.

NOMOJ DE KELKAJ PLEJ OFTAJ NEDERLANDAJ BIRDOJ

G. F. Makkink.

(Daŭrigo).

Voor verklaringen der letters tussen ()
zie Juni-no.

Bonte kraai — *Corvus cornix* — griza
korvo (S—UV), korniko (PV)

Raaf — *Corvus corax* — granda korvo
(S—UV)

Roek — *Corvus frugilegus* — kampo-
korvo (S—UV), frugilego (UV)

Kauw — *Coloeus monedula* — monedo
(UV)

Ekster — *Pica pica* — pigo (UV)

Gaai — *Garrulus glandarius* — garolo
(PV)

Koolmees — *Parus major* — granda
paruo (S—UV)

Pimpelmees — *Parus coerules* — blua
paruo (SM—UV)

Zwarte mees — *Parus ater* — nigra
paruo (SM—UV)

Kuifmees — *Parus cristatus* — hupa
paruo (S—UV)

Glanskopmees — *Parus palustris* — bril-
kapa paruo (M—UV)

Matkopmees — *Parus atricapillus* —
senbrilkapa paruo (M—UV)

Staatmees — *Aegithalos caudatus* —
longvosta paruo (M—UV)

Boomklever — *Sitta europaea* — eŭropa
sito (B—S)

Boomkruiper — *Certhia brachydactyla*
— mallongfingra certio (M—M)

Winterkoning — *Troglodytes troglodytes*
— troglodito (S)

Merel — *Turdus merula* — merlo (UV)

Belijster — *Turdus torquatus* — blank-
brusta merlo (S—UV)

Kramsvogel — *Turdus pilaris* — griza
turdo (B—UV)

Grote lijster — *Turdus viscivorus* — vis-
ka turdo (SM—UV)

Zanglijster — *Turdus philomelos* — kant-
turdo (B—UV)

Koperwiek — *Turdus musicus* — ruĝ-
aksela turdo (M—UV)

Gekraagde roodstaart — *Phoenicurus
phoenicurus* — ĝardena ruĝvostulo (S—
SM)

Zwarte roodstaart — *Phoenicurus och-
rurus* — nigra ruĝvostulo (SM—SM)

Blauwborst — *Luscinia svecica* — eŭro-
pa blugorĝulo (S—SM)

Nachtegaal — *Luscinia megarhyncha* —
eŭropa najtingalo (S—UV)

Roodborst — *Erithacus rubecula* — ruĝ-
gorĝulo (SM)

Roodborsttapuit — *Saxicola torquata* —
nigragorĝa saksikolo (S—M)

Paapje — *Saxicola rubetra* — blank-
gorĝa saksikolo (S—M)

Tapuit — *Oenanthe oenanthe* — enanto
(S)

Grasmus — *Sylvia communis* — blank-
gorĝa silvio (M—UV)

Braamslijper — *Sylvia curruca* — ba-
bilema silvio (S—UV)

Tuinfluitier — *Sylvia borin* — ĝarden-
silvio (S—UV)

Zwartkop — *Sylvia atricapilla* — nigra-
ĉapa silvio (S—UV)

Tijftjaf — *Phylloscopus collybita* — ĉil-
ĉafo (S)

Fitis — *Phylloscopus trochilus* — fiti-
so (S)

Fluiter — *Phylloscopus sibilatrix* — sib-
la filoskopio (B—M)

Spotvogel — *Hippolais icterina* — flava
hipolao (S—M)

Grote karekiet — *Acrocephalus arundi-
naceus* — granda akrocefalo (M—M)

Kleine karekiet — *Acrocephalus scirpa-
ceus* — skirpa akrocefalo (M—M)

Bosrietzanger — *Acrocephalus palustris*
— marĉa akrocefalo (S—M)

Rietzanger — *Acrocephalus schoenobaen-
us* — kanakrocefalo (M—M)

Sprinkhaanrietzanger — *Locustella na-
evia* — makulita ĝrilbirdo (S—S)

Goudhaantje — *Regulus regulus* — or-
verta regolo (M—UV)

Vuurgoudhaantje — *Regulus ignicapillus*
— fajroverta regolo (SM—UV)

Grauwe vliegenvanger — *Muscicapa stri-
ata* — griza muškaptulo (S—SM)

Bonte vliegenvanger — *Muscicapa hypo-
leuca* — blanknigra muškaptulo (M—SM)

Bastaardnachttegaal — *Prunella modu-
laris* — heĝpronelo (M—M)

Witte kwikstaart — *Motacilla alba* —
blanka motacilo (M—PV)

Grote gele kwikstaart — *Motacilla cine-
rea* — cindra motacilo (M—W)

Gele kwikstaart — *Motacilla flava* —
flava motacilo (S—PV)

Graspieper — *Anthus pratensis* — her-
beja pipio (S—S)

Boompieper — *Anthus trivialis* — arba
pipio (S—S)

Oeverpieper — *Anthus spinoletta* — ak-
va pipio (SM—S)

Pestvogel — *Bombycilla garrulus* —
bombicilo (S)

Klapekster — *Lanius excubitor* — gran-
da lanio (S—M)

Grauwe klauwier — *Lanius collurio* —
ruĝdorsa lanio (SM—M)

Spreeuw — *Sturnus vulgaris* — sturno
(UV)

(Finota)

